



Andreas Künzli

Enciklopedie tra planlingva Svislando

Interesaj ligoj inter svisaj esperantistoj kaj Germanio

Probable la plurkultura kaj multlingva karakteroj de Svislando, la svisa sento por malplimulto, la malfermiteco kaj pionira sinteno de multaj poliglotaj svisoj helpis, kial sennombraj homoj en tiu alpa respubliko, sed moderna industria ŝtato en la koro de Eŭropo sentis sin altirita de la lingva demando, kial ili lernas multajn etnolingvojn kaj kial ili lasis sin fascini ankaŭ de la okupiĝo pri neŭtralaj universalaj lingvoj (internaciaj planlingvoj).

Svislando kiel centro de pluraj planlingvaj movadoj

Kiel la 1129-paĝa Svisa Enciklopedio Planlingva, verkita de la svisa interlingvisto Andreas Künzli kaj aperinta en 2006 en eldono de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj Centro de dokumentado kaj studo pri la lingvo internacia (CDELI)*, celas montri, Svislando ludis centran rolon en la historio de pluraj internaciaj movadoj planlingvaj. Svislando do longe estis la lulilo de la:

- internacia movado Volapük
- internacia Esperanto-movado (UEA en Ĝenevo, revuo Esperanto)
- internacia Ido-movado
- internacia Occidental-Interlingue-movado
- internacia Interlingua-movado

Aliaj efemeraj planlingvoj

En la kazo de la nomitaj planlingvaj projektoj eblas konstati, ke ili sukcesis

transformi sian teorian sistemon en vivantan praktikan aplikon kun internacia signifo, dum lingvoprojektoj kiel Tersboca (1912), Parlamento (1918), Espido (1923), Ablemonde (1932), Fittusa (1935), Soma (1938), Neolatino (1947) k.a. restis neefektiveblaj kaj pro tio efemeraj, ĉar ili ne sukcesis trovi adeptaron. Do la historio de la svisa planlingva movado havas tri-partan strukturon: a) Esperanto kiel plej grava kaj plej longdaŭra planlingvo kun movado, b) Volapük, Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua kiel planlingvoj kun movadoj, kiuj estis iom gravaj, sed praktikataj nur dum pli malpli longa kaj limigita periodo kaj kiuj intertempe malaperis, kaj c) efemeraj lingvoprojektoj, kiuj restis teoriaj proponoj sen adeptaro. Samtempe estas interese konstati, ke aliaj pli malpli si-



Volapük-memortabulo en Litzelstetten-Konstanz.

gnifaj planlingvoj kiel ekzemple Idiom Neutral (1893-1902), Latino sine flexione (1903), Novial (1928) aŭ Basic

English (1937) ne estis praktikataj en Svislando.

Kompare kun Occidental kaj Interlingua, kiuj estis aŭ fariĝis esence lingvistikaj movadoj, la sola 'popola'




Memortabulo pri la restadejo de L.L. Zamenhof en Ĝenevo en 1905.

movado kun realaj sociaj funkcioj do restis la Esperanto-movado, iomete tio validis ankaŭ por la idista movado, kiu en Svislando praktike finiĝis kaj kiu internacie fariĝis efemera. La genia lingva konstruo kaj la ideologia fono de Esperanto kaŭzis ĝian nepridisputeblan venkon super la aliaj planlingvaj sistemoj, kiuj nuntempe staras ekster ĉia diskuto kaj kiuj havas sole scienc esploran valoron. La Esperanto-movado diferenciĝas disde la aliaj planlingvaj movadoj ankaŭ en tio, ke ĝi portas en si la t.n. 'internan ideon', kiu siaflanke estas bazita sur la zamenhova 'homarismo', kiun la aliaj planlingvaj movadoj ne konas.

Zamenhof kaj Svislando

L.L. Zamenhof aparte ŝatis Svislandon kiel “plej neŭtralan landon de Eŭropo” kaj pritaksis ĝin taŭga por la efektivigo de “neŭtrale homa” Esperanto-mondkongreso, kiel ĝi efektive



Ludoviko kaj filo Adam Zamenhof en Berno en 1913.

okazis en 1906 en Ĝenevo kaj poste okazos ankoraŭ kvinfoje en Svislando. Samtempe la kreinto de Esperanto, kiu mem plurfoje vizitis Svislandon, esperis, ke ĉi tiu landeto sen nacia lingvo iam fariĝos la natura centro de la esperantismo. La starigo de UEA en Ĝenevo en 1908 sendube konformis al tiu deziro. La konata nobelpremiito pri kemio de 1909, Wilhelm Ostwald el Leipzig, kiu inkliniĝis al Ido, proponis en 1910 en sia publika prelego en Bazelo, ke Svislando instalu “lingvan oficejon” por la promociado de neŭtrala mondlingvo.

Pri la disvastiĝo de planlingvoj en Svislando

La diversaj planlingvoj disvastiĝis varie laŭ regionoj: Dum Volapük trovis la plimulton de siaj adeptoj en germanlingva orienta Svislando, la Esperanto-movado ekprosperis en la romanda parto, precipe Ĝenevo, Vaŭdo, Neŭŝatelo, antaŭ ol ĝi atingis ankaŭ Alemanion. Svisa Esperanto-Societo (SES) fondiĝis en 1903 en Rolle (Vaŭdo) kiel dua landa asocio post la franca.

Demografie, en preskaŭ ĉiuj pli dense loĝataj regionoj kaj kantonj vivis

kaj vivas adeptoj de Esperanto, kompare fortaj ĉeloj ĉiam ekzistis en Berno kaj Neuchâtel kaj daŭre ekzistas en la urboj Ĝenevo, Laŭzano, Bazelo, Zuriko, Lucerno, Wil/SG. La Esperanto-grupoj formiĝis unuavice en urboj aŭ urbetoj, dum en la kamparo ekzistas maksimume unuopuloj neorganizitaj. La planlingva movadeto preskaŭ mankas en konservativaj kaj iom izolitaj regionoj (ekzemple Centra Svislando,



Esperanto-vendejo en Ĝenevo en 1906.

Valezo). Pli frue ekzistis Esperanto-grupoj ankaŭ en malpli grandaj urboj kiel Morges, Vevey, Thun, Bellinzona, Locarno, Chur, Herisau, Burgdorf k.a. Nuntempe tio ne plu estas la kazo, kaj la Esperanto-grupoj en la supre nomitaj grandurboj estas tre malfortaj, parte vegetantaj aŭ eĉ elmortontaj, se refreŝiĝo



Kongreskarto.

ne okazos. Svisa Esperanto-Societo havas nuntempe ĉirkaŭ 160 membrojn.

Socidemografia bunteco

El socidemografia vidpunkto la adeptaro de la neŭtralaj universalaj lingvoj formiĝas el plej diversaj profesioj

(relative multaj instruistoj, fervojistoj, kelkaj kuracistoj, malpli da komercistoj kaj laboristoj), tavoloj (precipe mezklasuloj kaj homoj kleraj kun pli alta profesia eduko kaj kun kulturaj interesoj), seksoj (viroj kaj virinoj estas pli malpli ekvilibre reprezentataj, ekzistas pluraj esperantistaj geedzoj kaj familioj). Aktivado ofte okazas en la loka grupo, kie oni establas rilatojn profundajn kaj daŭrajn. El tiu bunteco montrita evidentas, ke ekestis pluraj fakaj organizoj, aŭ speco de submovadetoj: ekzemple instruistoj (EES, KCE, ILEI-sekcio), fervojistoj (SAEF); religiemuloj (kristanoj kun KELI- kaj IKUE-sekcioj, bahaanoj), laboristoj, blinduloj k.a. Esperantisto povas aparteni al diversaj submovadetoj samtempe. La Esperanto-movado posedas membrojn, kiuj agadas ankaŭ en movadoj ideologie kvazaŭ iom ‘parencaj’ aŭ almenaŭ ‘najbaraj’. Inter tiuj troviĝis – kaj en unuopaj kazoj daŭre troviĝas



Oficejo de UEA.

- ekzemple la naturamikoj, fervojistoj, laboristoj, religiemuloj ĉiuspecaj, do kristanoj, bahaanoj, kvakeroj, ateistoj, spiritualistoj, bontemplanoj, civilservistoj, framasonoj, vegetaranoj, kontraŭalkoholistoj, pacaktivuloj kaj kontraŭmilitistoj, politikemuloj diversaj, filozofoj, socialistoj, komunistoj kaj kontraŭ-komunistoj, blinduloj, lingvistoj, literaturistoj, ĵurnalistoj, instruistoj-pedagogoj, didaktikistoj, etnistoj, kooperativanoj, sindikatistoj, mondfederalistoj kaj mondcivitanoj, sed ankaŭ komercistoj, skoltoj, biciklistoj, naturistoj, radioamatoroj, filantropoj k.a. La interkontaktoj de la esperantistoj kun anoj de parte samcelaj idealismaj kaj filantropiaj movadoj, kaj inverse, ne malofte kaŭzis utilajn sinergiajn.

Naville, Hodler, Privat kaj kompanio

Gravaj svisaj pioniroj de la Esperanto-movado, kiuj estas konataj ankaŭ eksterlande, ĉar ili posedas internacian signifon, nomiĝas René de Saussure (1872-1943), Hector Hodler (1887-1920) kaj Edmond Privat (1889-1962). Ĉi tiuj tri intime kunlaborantaj aktivuloj estis rekte ligitaj kun la fondo de Universala Esperanto-Asocio en 1908 en Ĝenevo. Tial tiuj personecoj restas eternaj legendoj por la esperantistaro.

Kelkaj aliaj signifaj personecoj de la publika vivo ja esprimis sian principan simpatian aŭ eĉ vigle apogis Esperanton, ĉu morale, ĉu finance, ĉu alimaniere: ekzemple Ernest Naville (filozofo), Auguste Forel (psikiatro, pacaktivulo), Pierre Bovet (pedagogo, ankaŭ lia filo Daniel), Emil Frey (politikisto), Arnold Bohren (politikisto), Eugène Failletaz (komercisto), Jacques Mühlethaler, Pierre Cérésolle, Edouard Claparède, Marc Rohrbach (pacaktivuloj), Marguerite Bosserdet (pedagogino) k.a., por nomi nur kelkajn elstarajn svisajn nomojn. Oni ne forgesu ankaŭ la vicon de konataj svisaj lingvistoj, kiuj interesiĝis pri la planlingva demando: Ferdinand de Saussure, Eduard Schwyzer, Eduard Debrunner, Otto Funke k.a. Sole Gonzague de Reynold (1880-1970), konservativa intelektulo el Friburgo, kadre de Ligo de Nacioj publike malrekomendis Esperanton, kiun li malŝategis kaj nomis „barbara”.

Ses Universalaj Kongresoj

En Svislando estis organizitaj entute ses Universalaj Kongresoj: en 1906 kaj en 1925 en Ĝenevo, en 1913, 1939 kaj 1947 en Berno kaj en 1979 en Lucerno. Ankaŭ aliaj planlingvaj movadoj okazigis siajn kongresojn, ekzemple la idistoj kunvenis en 1939 en St. Gallen, kaj la internaciaj Interlingua-kongresoj disvolviĝis en Basel en 1957 kaj 1971. Internacia renkontiĝo de la adeptoj de Occidental okazis en 1958 en St. Gallen kaj Romanshorn. La unua Volapük-mondkongreso okazis en 1884 en Friedrichshafen sur la germana bordo de la Konstanca Lago.

Klopodoj de instituciigo

Estis faritaj pluraj provoj kaj klopodoj, ke la planlingvoj instituciigu kaj estu oficiale agnoskitaj de ŝtataj instancoj. En la kazo de Esperanto oni povas registri tian klopodon ekzemple dum la 1920aj jaroj, kiam kadre de Ligo de Nacioj estis provite, per rezolucia projekto (Privat, Bovet k.a.), rekomendi al la membro-ŝtatoj de la Ligo la enkondukon de Esperanto en iliajn lernejojn. La celaro kaj agado de CDELI, KCE/IFA en la 60-80aj jaroj, efektivigitaj precipe de idealismaj romandaj pedagogoj, kiuj dediĉis sian vivon al Esperanto kaj al la studo de planlingvoj, eble signifis dume la kulminon de tiuj strebadoj. Ĝis kiu grado tiuj klopodoj estis/as longdaŭre sukcesaj – tio estas alia demando.

Krizaj simptomoj

Koncerne la svisan Esperanto-movadon mem estas konstateble, ke post



Jean Borel.

la fonda kaj pionira periodo, kiu daŭris ekde la komenco de la 20a jarcento ĝis la dua mondmilito, kaj post la stabiliga kaj kreska periodo post 1945 la kulmino de la svisa Esperanto-movado estis atingita fine de la 1980aj jaroj. Ĝia sekva ekzistokrizo koincidas kun la falo de la muro en orienta Eŭropo, la enkonduko de nova politika kaj ekonomia ordo en tiun mondonparton kaj la venko de la angla lingvo en politiko, komerco, scienco ktp. Komence de la 1990aj jaroj gravaj pilieroj de la Esperanto-movado en Svislando ekkrisis (ekzemple Kultura Centro Esperantista) aŭ eĉ forfalis (ekzemple Gastejo Edmond Privat kaj la Esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia), kaj malaperis pluraj fakaj kaj lokaj Esperanto-asocioj, kiuj antaŭ

kelkaj jardekoj estis signifaj kaj prosperaj (ekzemple la Esperanto-asocioj de la tiĉinanoj, katolikoj kaj fervojistoj); tial oni estas devigata esprimi sian zorgon pri la estonteco de la Esperanto-movado. Aliflanke aliaj formoj kaj novaj rimedoj kiel ekzemple la mondvasta interreto, ebliganta rapidan interkorespondadon kaj senperan alireblon al informoj (kiuj estas utilaj, se ili estas aktualaj kaj korektaj), malfermas novajn perspektivojn. Oni troviĝas en historie grava transira tempo, de kiu ankaŭ la Esperanto-movado ne povas resti netuŝita.

Nerimarkite de la ekstera publiko

La historio de la neŭtralaj universalaj lingvoj en Svislando disvolviĝis grandparte nerimarkite de la ekstera publiko, kiu ne havis/as spertojn kun Esperanto aŭ alia planlingvo, malfacile imagante pri kio temas. Ĉar la antaŭjuĝoj estas tro fortaj, sekve aperas skeptiko kaj kontraŭstaro. Ĉi tiu ekstera publiko do ne hezitas nomi la esperantistojn utopistoj, stranguloj, sektemuloj, frenezuloj k.s. La svisa gazetaro abunde konsideris kaj atentis la temon de la neŭtrala universala lingvo, praktikante ian atendo-sintenon rilate la enkondukon de tia lingvo, kiu finfine ne okazis. Observblas granda abismo unuflanke inter la optimismo de planlingvaj adeptoj mem, kiuj diversrimede klopodis vekti publikan atenton kaj varbi por Esperanto pere de la gazetaro, kaj aliflanke la skeptiko kaj pesimismo ekzemple de ĵurnalistoj, neadeptoj, malsimpatiantoj aŭ kontraŭuloj, kiuj konservis siajn tradiciajn antaŭjuĝojn aŭ eĉ sian rifuzan sintenon vidalvide de la ekzisto aŭ adopto de neŭtrala universala lingvo.

Interesaj ligoj inter svisaj esperantistoj kaj Germanio

En la Svisa Enciklopedio Planlingva estas montrataj pluraj interesaj ekzemploj de rilatoj kun Germanio, kiuj koncernas ĉefe la germanan devenon de kelkaj gravaj protagonistoj aŭ ilian agadon en Svislando. Nu pri la germana, fakte sudbadena deveno de Johann Martin Schleyer (1831-1912), inven-

tinto de Volapük, oni ne devas aparte atentigi, chu ne. Lia agado en Litzelstetten-Konstanz estas sufiĉe bone konata kaj esplorata. Ankaŭ informataj estas la germanaj esperantistoj pri la fratoj Jean kaj Jules Borel, kiuj estis svisdevenaj (el la neŭŝatela kantono) kaj kiuj esence kontribuis al la starigo de la berlina kaj germana Esperanto-



Bazela
esperantistino
Erna Döring.

movadoj. En la Enciklopedio de Esperanto (1933) Jean Borel estas eĉ nomita la «kreinto de Esperanto-movado en Germanujo». Kiel konate la du fratoj agadis en sia legendeca firmao Müller & Borel GmbH en Berlino, kadre de kiu estis produktitaj diversaj Esperanto-lernolibroj en grandega kvanto. Post la bombado de Berlino, en kiu pereis ankaŭ ilia fabriko, la fratoj fuĝis de tiu terura sortobato kaj revenis al Svislando, kie ili mortis, Jean en 1946, Jules unu jaron poste. La fama svisa psikiatro Auguste Forel (1848-1931), kiu studis medicinon en Zuriko, laboris kiel asistanto en Munkeno kaj edziĝis kun germanino. La plej maljuna esperantisto iam vivinta en Svislando nomiĝis Friedrich Bierhoff (1886-1988). Li devenis el Vestfalia kaj laboris kiel fervojisto ĉe la Prusa Fervojo en Rejnlando, poste en la stacidomo de Leipzig, antaŭ ol translokiĝi al Konstanco en suda Baden kaj en 1957 al Svislando.

Apenaŭ konata esperantisto, pri kiu indas raportoj kaj pri kiu mi sukcesis trovi biografiajn notojn tra liaj posteuloj, nomiĝis Wilhelm Haase. Ĉi tiu germandevena samideano, kiu naskiĝis en 1885 en Dürren-Selchow ĉe Zehden/Oder, laboris kiel drogisto en Breslau, Berlin kaj Duisburg. Poste li kunfondis la Esperanto-grupojn en Burgdorf/BE (1909), Olten/SO (1914) kaj Chur/GR (1931), kie li forpasis en 1969. En Emmental li konatiĝis kun sia onta edzino

Clara Meister, kiu same estis esperantistino.

La familio de Jeanne Schmutz (1895-1982) devenis el germana Vestfalia, kie ŝia patrino rilatis kun la grupo ĉirkaŭ la fama socialdemokrato August Bebel (1840-1913). Sekve al la kontraŭ-socialdemokrata leĝo de imperiestro Vilhelmo de la 21a de oktobro 1878, la patro devis forlasi Vestfalion kaj



Glumarko de la 4a UK en Berno (1913).

ekloĝis en Montreux/VD, kie li malfermis horloĝan kaj juvelan vendejon. De 1925 Jeanne Schmutz loĝis kun sia edzo Hermann (1896-1993) en Allschwil/BL.

Naskita en Bazelo en 1920, la konata bazela esperantistino kaj iama TANEF-aktivulino Erna Döring, kiu havis germanan patron, translokiĝis en 1921 kun sia familio al Dresdeno. Tie ŝia svisa patrino fariĝis esperantistino. En 1929 la familio Döring revenis al Svislando. Alia svisa esperantisto Walter Giannini (1914-2003), kiu eble iom forgesiĝis de la postaj generacioj, studis en Majenco muzikon kaj en 1931 aliĝis al la alternativa ĝardenkonstrua kolonio Schurrenhof en Donzdorf en Virtembergo. Pro kritika artikolo en svisa gazeto kontraŭ la hitlera reĝimo li estis kondamnita al malliberejo, sed dank' al sia duobla ŝtataneco povis en 1934 translokiĝi al Svislando. Dum la unua mondmilito la bazela kuracisto Alfred Bader (1889-1968) deĵoris en la militaj lazaretoj de Germanio kaj poste laboris kiel okulkuracisto en Svislando. Post sia porinstruista lernejo en Porrentruy (1927-31) Marcel Erbetta (1911-1996), la inventinto de la lernejoj rondo Granoj en Vento, laboris unue en Lippe-Detmold (Germanio, 1931) kaj en Orienta Prusujo (1932), kie li fakiĝis pri

germana lingvo. La svisa ĵurnalistino Heidi Baur-Sallenbach (1916-2006), la edzino de la konata svisa esperantisto Arthur Baur, doktoriĝis en 1941 per disertacio pri George Sand kaj la germana emancipiĝa romano.

Laŭ la versmetro de la germana originalo Wilhelm Tell de Schiller estis esperantigita de Ludwig Emil Meier (+1919), germana Esperanto-pioniro kaj eksa volapukisto el Munkeno kaj Nurenbergo. Svisaj rakontoj nomiĝis la kajero 7/8 en la serio Internacia Librotrezoro, eldonita de Germana Esperanto-Librejo en 1913 en Leipzig (Germanio).

Uhlmann kaj Unger

Du aliaj interesaj svisaj personecoj, kiuj estas menciindaj lige kun Germanio, estas Friedrich (Fritz) Uhlmann kaj Hans-Joachim Unger. La medicinisto Uhlmann (1881-1938) studrestadis i.a. en Halle kaj poste laboris kiel kuracisto en Schussenried, Virtembergo. En 1912 li fariĝis framasono en la loĝio Karl zu den drei Ulmen en Ulm. Unger (1894-1984), kiu naskiĝis en Brunsviko, estis ĵurnalistino kun doktora titolo kaj redaktoro de turismaj periodaĵoj en la germana lingvo kaj de



Ĵurnalistino Hans-Joachim Unger.

samspecaj revuoj en Esperanto. La fontoj (vd. Ulrich Lins, La danĝera lingvo) rakontas pri iu incidento kun Reinhard Heydrich, la ĉefo de la naci-socialisma polico kaj gvidanto de SS, kies suspekto kontraŭ Esperanto kiel eltrovaĵo de judo Unger persone spertis kiam li rolis en Berlino kiel kunlaboranto de la gazetara agentejo Associated Press. Nome post esperantista renkontiĝo en berlina kafejo Unger estis vokita al la oficejo de Gestapo, kie Heydrich persone kulpigis lin organizi „internacian

reton“ kontraŭ la Tria Regno helpe de la esperantistoj. Similajn riproĉojn Un-ger poste aŭdis de Rudolf Hess, la lasta anstataŭanto de Adolf Hitler, kiu ŝajne revis pri iu simpligita germana lingvo, altrudenda al la tuteŭropa ŝtata federacio sub nacisocialisma hegemonio. Nelonge post tiuj okazaĵoj eksplodis la dua mondmilito.



Esperantisto-framasono
Friedrich Uhlmann.

La belgdevena esperantisto Hector Boffejon (1901-1983) pasigis kvar jarojn en diversaj naziaj koncentrejoj (Mauthausen, Dachau), antaŭ ol li translokiĝis al Svislando. Ankaŭ la italdevena ĝeneva esperantisto Furio Gabbrielli (*1927) en 1944-45 restadis kun sia patro en la koncentrejo de Dachau kaj en Kahla. Post la dua mondmilito la romanda esperantisto Jules Gilliard (1901-1962) organizis kun la zurika samideano Fritz Liechti kaj pastoro Edouard Waldvogel la helpagadon favore al la malsataj germanoj.

Jakob, Stettler, Kreuz

Hans Jakob (1891-1967) estis grava Esperanto-aktivulo de germana deveno (Mannheim, Heidelberg) kaj kun internacia signifo, kiu laboris dum duonjarcento por UEA en Ĝenevo kaj aktivis sur pluraj aliaj kampoj. En 1912 Jakob venis al Ĝenevo propradire kun la celo praktiki la francan lingvon. Ekde 1913 Hector Hodler engaĝis lin kiel oficiston en la Centra Oficejo de UEA en Ĝenevo. Ankaŭ lia UEA-kolego Eduard Stettler (1880-1940) iam vizitis la universitaton en Heidelberg. La iama direktoro de la Centra Oficejo en Ĝenevo kaj ĝenerala sekretario de Internacia Centra Komitato, Robert

Kreuz (1894-1936), devenis el Germanio (li naskiĝis en Majenco).

Germandevena estas ankaŭ la esperantisto Rudi Hauger (*1930), diplomita kemiisto (universitato de Saarbrücken), kiu fariĝis konata al la internacia publiko precipe kiel scienca preleganto dum la kongresaj universitatoj. Li loĝas apud Zuriko.

Lingvistoj Schwyzer, Debrunner kaj Mangold

Du svisaj lingvosciencistoj, kiuj iom okupiĝis pri la internacilingva ideo kaj fervore esprimis pri ĝi, kaj kiuj estis profesie firme ligitaj kun Germanio,



Lingvisto Eduard Debrunner.

nomiĝis Eduard Schwyzer (1874-1943) kaj Albert Debrunner (1884-1958). Studinte hindeŭropan lingvoscienccon kaj grekan lingvon en Zürich kaj Leipzig, en postaj jaroj la sekvaj sciencaj meritoj de Schwyzer kondukis lin en 1926 al la universitato de Bonn kaj en 1932 al lia katedro pri hindeŭropa lingvokomparo en Berlino. Schwyzer fariĝis membro de la Prusa Akademio de Sciencoj kaj mortis en Berlino. Post periodo kiel eksterordinara profesoro en la universitato de Greifswald (1918-20), en 1920 la elstara hindeŭropikisto Debrunner akceptis vokon kiel ordinara profesoro pri klasika filologio kaj lingvistiko en la berna universitato. En 1925 li reiris al Germanio kiel ordinara profesoro en la universitato de Jena, kie li restis ĝis 1935. Sub la premo de la nacisocialismo Debrunner revenis al Berno.

Cetere ankaŭ Ferdinand de Saussure (1872-1943) kelkajn jarojn faris siajn lingvistikajn studojn en Leipzig kaj Berlin ĉe famekonataj profesoroj

(1876-1880). En Leipzig en februaro 1880 li doktoriĝis (summa cum laude) pri la uzo de la absoluta genitivo en sanskrito.

Nelaste oni devas menciigi la svisdevenan lingviston Max Mangold (*1922). Ekde 1957 li laboris en la universitato de Sarlando en Saarbrücken kiel profesoro pri fonetiko kaj fonologio. Liaj konsideroj pri planlingvoj kaj Esperanto estas troveblaj en diversaj sciencaj studoj kaj apartenas al la klasika fakliteraturo pri la temo.

KCE, KELI, IKUE

En siaj gloraj tempoj, Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds estis ŝate vizitataj ankaŭ de ne malmultaj germanaj esperantistoj. En 1991 la meritoj de KCE-direktoro Claude Gacond (*1931) estis agnoskitaj per la aljuĝo de la unua Esperanto-kulturpremio de FAME kaj de la urbo Aalen (Germanio) je la valoro de 10000 germanaj markoj.

Okazintaj naciaj kaj internaciaj kristanaj Esperanto-aranĝoj, precipe eku-menaj, en Svislando estis partoprenataj ankaŭ de la germanaj aktivuloj Adolf Burkhardt (1929-2004), luterana pastoro, prezidanto de KELI inter 1961 kaj 1975 kaj denove de 1981 ĝis 2000, kaj de la katolika pastoro Bernhard Eichkorn (IKUE).

Ĉi tiu listo de svisaj-germanaj konektoj ne estas kompleta. Traesplorante la svisan enciklopedion oni trovos ankoraŭ aliajn, eble malpli atentokaptajn menciojn de tiaj konektoj, kiuj estas sendube tre interesaj. Tiu fakto ja pravas, ke multaj svisaj-germanaj interrilatoj ja okazis dum la paso de la tempo. Cetere multaj svisaj esperantistoj lernis Esperanton laŭ la lernolibroj de Wilhelm kaj Hans Wingen kaj daŭre uzadas la vortarojn de Erich-Dieter Krause, de kiu ĵus aperis la plej granda vortaro germana-Esperanto.

Svisa Enciklopedio Planlingva

La aktiva laboro de la movado por la disvastigo de neŭtrala universala lingvo (internacia planlingvo) en Svislando jam de kelka tempo atingis la duan jar-

centon. En tiu konscio fortiĝis la deziro resumi kaj bilanci la ĝisnunan agadon de tiu periodo, kies specifa kaj unika idea historio estis plena je eventoj, sukcesoj, kulminoj, sed ankaŭ problemoj kaj fiaskoj. La verko Universalaj Ling-



Konstruaĵo de la Urba Biblioteko en La Chaux-de-Fonds, kie lokigas CDELI.

voj en Svislando aŭ Svisa Enciklopedio Planlingva estis lanĉita kun la celo sisteme kolekti kaj prilabori faktojn kaj datojn el la historio de la planlingvaj movadoj en Svislando, antaŭ ĉio de Esperanto kiel ĝia plej grava reprezentanto, kaj disponigi ilin al la interesata publiko en formo de enciklopedio. Ĝiaj ĉefaj intencoj estas havigi al la esperantistoj, planlingvanoj kaj interlingvistoj, sciececan referencilbron, krei impresan pruvilon por demonstri la ekziston de la planlingva realeco en Svislando. Ĉar la libro reliefigas ankaŭ eventojn kun internacia signifo, ĝi estas leginda ankaŭ de alilandaj esperantistoj.

* Künzli, Andreas (2006): Universalaj Lingvoj en Svislando. Svisa Enciklopedio Planlingva. Schweizer Plansprachen-Lexikon. Encyclopédie suisse des langues planifiées. Enciclopedia svizzera delle lingue pianificate (Volapük, Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua). La Chaux-de-Fonds: SES (Svisa Esperanto-Societo) et CDELI (Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale), Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds. ISBN 2-9700425-2-5, 1129 S. (zahlreiche Illustrationen, z.T. farbig), Preis € 60.- (plus Versandkosten, ca. € 15.-)

Pliajn informojn pri la verko kaj la temo oni trovas sub www.planlingvoj.ch

Zusammenfassung auf Deutsch:

Die Schweiz stellt wohl aufgrund ihrer nationalen Eigenart, ihrer Multikulturalität und Mehrsprachigkeit ein ungewöhnliches Experimentierfeld, sozusagen ein 'Eldorado' für neutrale Universalsprachen aller Art wie Esperanto, Ido, Occidental und Interlingua dar. Mit seinem Dokumentationszentrum für Plansprachen ist die Stadtbibliothek von La Chaux-de-Fonds (CDELI) auf die Erforschung neutraler Universalsprachen spezialisiert.

Die Tätigkeit für die internationale Plansprachenbewegung in der Schweiz ist über hundert Jahre alt. In diesem Bewusstsein entstand das Bedürfnis, für diese lange Periode, die voller Ereignisse, Erfolge und Probleme war, Bilanz zu ziehen. Die Schweizerische Plansprachen-Enzyklopädie, die 2006 herauskam, ist die Frucht dieser konstanten Bemühungen.



Andreas Künzli beim Deutschen Esperanto-Kongress in Braunschweig.

Was hier stolz präsentiert wird, ist die erste Enzyklopädie der Geschichte der Plansprachenbewegung(en) der Schweiz von den Anfängen bis zur Gegenwart. Die meisten Zeitgenossen denken, dass es eine solche Geschichte, eine solche Bewegung gar nicht gibt. Mit dem vorliegenden Werk, das von dem Schweizer Interlinguisten und Esperantisten Andreas Künzli erstellt wurde, und das die Kurzbiographien von über 500 Personen und Persönlichkeiten der Schweizer Plansprachenbewegung erschließt, soll das Gegenteil dokumentiert und bewiesen werden.

Die Enzyklopädie, die in Esperanto abgefasst ist und 1129 Seiten umfasst,

enthält zahlreiche Einträge über wichtige Personen und Organisationen, sowie eine Chronologie und eine Bibliographie. Daneben sind auch Beiträge auf Deutsch, Französisch, Italienisch, Rätomanisch und Englisch, verfasst von namhaften Esperantologen, zu finden.

Es fehlte seit langem ein Nachschlagewerk, das umfassend über Personen Auskunft gibt, die in der Geschichte der Plansprachen eine maßgebliche Rolle gespielt haben und spielen. Diesem Mangel will dieses Buch abhelfen. Wir hoffen, dass unser umfangreiches Lexikon die persönlich-menschliche Dimension der Schweizer Plansprachenbewegung einprägsam zum Ausdruck bringen wird. Denn was die Plansprachenaktivisten in den vergangenen Jahrzehnten in ihrer Gesamtheit geleistet haben, ist eindrucklich und bedarf der besonderen Würdigung. Die Enzyklopädie erschien – wenn auch mit Verspätung – aus Anlass des 100-jährigen Jubiläums der Schweizerischen Esperanto-Gesellschaft (2003) und im Rahmen des 50-jährigen Bestehens des Centre de Documentation et d'Etude sur la Langue Internationale (CDELI) in La Chaux-de-Fonds.

Integriert in die Enzyklopädie ist eine umfassende Anthologie, die «klassische» Texte zum Plansprachendiskurs enthält, die von der Feder u.a. von Naville, Schwyzer, Cingria, Zamenhof, Hodler, Schrag, Frey, Bovet, Völkerbund, Gonzague de Reynold, Privat, Cornioley, Baur, Haas, Klaesi, Hamburger, Schild, Piron, stammen. Ein Esperanto-Französisch-Deutscher «Schlüssel» im Anhang des Werks dient Nicht-Esperantisten zum besseren Verständnis des Esperanto.

Weil das Werk auch Ereignisse von internationaler Bedeutung beleuchtet, ist es so nicht nur exklusiv für eine schweizerische Leserschaft von Interesse, sondern wird es auch für Esperantisten und Plansprachlern in anderen Ländern lesenswert.

Weitere Informationen zum Buch und zum Thema auf www.plansprachen.ch

Esperanto bei Rededuell „Sprachenvielfalt in Europa: Kulturgut oder Luxus“ in Berlin

Im Frühjahr 2007 erhielt der Deutsche Esperanto-Bund überraschend die Einladung an einem Rededuell am 22. Juni zu dem Thema „Sprachenvielfalt in Europa: Kulturgut oder Luxus“ der Europa-Union teilzunehmen. Gerne nahm der neue Vorsitzende des Deutschen Esperanto-Bundes Dr. Rudolf Fischer die Einladung an, zumal der Deutsche Esperanto-Bund ja nicht häufig die Gelegenheit hat sich in offiziellen Kreisen zu präsentieren. Neben Rudolf Fischer nahmen Jochen Richter (stv. Kabinettschef bei Leonard Orban, Kommissar für Mehrsprachigkeit und Prof. Dr. Norbert Walter (Geschäftsleiter Deutsche Bank Research und Chefvolkswirt der Deutschen Bank Gruppe) an dem Rededuell teil.

Das Rededuell sollte mögliche Wege in der Sprachenpolitik aufzeigen. Es ging um die Frage wie sich Verständigung, Effizienz und Identität in der EU am besten erreichen lassen, ob durch den Status der Vielsprachigkeit oder die Einführung einer europäischen Verkehrssprache. Jochen Richter stand für den Status der Vielsprachigkeit, Norbert Walter für Englisch als Verkehrssprache und Rudolf Fischer für Esperanto und zusätzlichen Erhalt der Vielsprachigkeit.

Das Rededuell begann mit einer Überraschung. Bei einer Abstimmung vor Beginn des Rededuells lag Esperanto als Verkehrssprache zusammen mit Englisch vollkommen gleichauf.

Im Verlaufe der Diskussion stellten die Teilnehmer ihre Positionen dar. Jochen Richter vertrat eloquent und sicher die Position der Vielsprachigkeit. Eine europäische Verkehrssprache werde nicht benötigt. Norbert Walter setzte sich mit teils abstrusen Vorstellungen für Englisch als Verkehrssprache Europas ein, während Rudolf Fischer die Vorzüge des Esperanto der Zuhörerschaft näher brachte, aber gleichzeitig betonte, dass Esperanto keineswegs die europäische Sprachenvielfalt beeinträchtigen wolle. Im Verlaufe der Diskussion kam klar

zum Ausdruck, dass die Vielsprachigkeit einerseits nur unter einem erheblichen Kostenaufwand bewahrt, bzw. erreicht werden kann und zum anderen die kleineren Sprachen längst von den großen Sprachen an die Seite gedrängt werden. Eine Änderung der Situation zugunsten der englischen Sprache, so wurde es sogar von Norbert Walter klar dargestellt, bedürfe einer gigantischen Investition und Verbesserung des Sprachunterrichts. Rudolf Fischer konnte somit mit der einzigen kostengünstigen und realisierbaren Alternative aufwarten. Daneben stellte er sinnvolle Einführungsstrategien des Esperanto zur Verfügung.

Am Schluss der Diskussion gab es erneut eine Abstimmung. Aufgrund der etwas veränderten Fragestellung blieb das Englische gegenüber der Vorabstimmung bei gleichen Stimmenanteilen, während die Position von Jochen Richter etwas hinzugewann und Esperanto etwas an Stimmenanteilen verlor. Dies mag daran gelegen haben, dass vielen Teilnehmern nicht bewusst war, dass die Position von Rudolf Fischer ja eigentlich die Vielsprachigkeit beinhaltete und sich bei Esperanto als europäischer Verkehrssprache eben auch kleinere Sprachen gegenüber den größeren behaupten könnten, während es bei dem Englischen als europäischer Verkehrssprache auf eine Dominanz dieser Sprache hinauslief. Dies zeigt eindeutig wie hart wir im Bereich „Öffentlichkeitsarbeit“ für unsere Positionen arbeiten müssen. Können wir einerseits herausstellen, dass es schon jetzt keine Gleichberechtigung der Sprachen in der EU gibt und es bei Englisch als europäischer Verkehrssprache trotz eines erheblichen Finanzeinsatzes letztendlich zu einer Katastrophe für die Sprachenvielfalt in Europa kommt, hat unsere Position gewonnen. Bei nachfolgenden Tischgesprächen während eines Imbisses konnten die anwesenden ca. zehn Esperanto-Sprecher bei den Teilnehmern noch einige Punkte gutmachen. Hier zeigte sich, dass der Wissensstand um Esperanto auch bei relativ gut gebil-

deten Schichten eher dürftig ist. Nach Information und Argumenten war man der Position von Rudolf Fischer eher zugänglich. Insgesamt eine sehr gelungene Veranstaltung für den Deutschen Esperanto-Bund. Einen großen Dank an Rudolf Fischer, der unsere Position würdig vertreten hat.

Martin Schäffer

Esperanto antaŭ grava publiko en Berlin

Mi ŝatus aldoni ankoraŭ kelkajn informojn kaj komentojn al la germanlingva raporto de Martin Schäffer pri la „parol-duelo“ ĉe „Europa-Union“ la 22an de junio en Berlin.

La starigo de tri starpunktoj („ĉiuj lingvoj“, „nur la angla“, „nur Esperanto“) estis dekomence fuŝa, ĉar tiuj tri lingvopolitikaj sloganoj ne estis inter si ekskluzivaj kaj apenaŭ klare difinitaj. Tial la aŭskultantoj, precipe fine de la aranĝo, ne sciis, por kio voĉdoni. La publiko laŭ la listo de la ĉeestantoj konsistis ĉefe el funkciuloj de ŝtataj instancoj, de Europa-Union, de aliaj gravaj asocioj, de ambasadejoj (brita, itala, slovaka), k.a. La homoj pli-malpli do estis „imunaj“ kontraŭ novaj ideoj kiel apliko de Esperanto en la Eŭropa Unio. Mi do koncentris min, ne provi konvinki, sed pozitive informi ilin pri la ekzistanta Esperanto-mondo.

Mi atendis, ke miaj kun-„duelantoj“ atakos min per riproĉoj kontraŭ Esperanto. Tio tute ne okazis. Jochen Richter asertis, ke la ĉiama tradukado kaj interpretado el ĉiuj lingvoj al ĉiuj funkcias kaj ke do interlingvo estas superflua. Mi demonstris je la amuzo de la ĉeestantoj la kontraŭon per jena ekzemplo:

La 9an de majo prof. d-ro Reinhard Selten diris antaŭ la Eŭropa Parlamento i.a.: „Ĉiuj EU-ŝtatoj enkonduku Esperanton kiel unuan fremdan lingvon, poste eblos pli facile lerni alian nacian lingvon.“ En la koncerna hispana traduko oni legis: „... enkonduku Esperanton kiel unuan lingvon, kaj poste ili povas lerni la lingvon de (sia) ŝtato.“

Prof. d-ro Norbert Walter de Deutsche Bank diris komence malantaŭ la kuli-

soj lakone: „Diskuto ne necesas. Mi estas ‚usonano‘. Punkto.“ Mi povis poste kontraŭi publike plurajn el liaj eldiroj, ekzemple ke la germanoj tial ne majstras la anglan, ĉar la lernejoj kaj la instruistoj ne taŭgas ktp. Nek li nek s-ro Richter estis ja lingvistoj kiel mi, tiel ke oni jes atentis miajn eldirojn kaj taksis ilin seriozaj.

Tio neniel ŝanĝis kompreneble la situacion, ke la granda plimulto en la publiko deiris de la konata starpunkto: „La neceso, regi la anglan, estas fakto. La angla estas simpla. Do, ni ne bezonas Esperanton.“ Tion mi antaŭvidis, sed tamen kelkaj aferoj okulfrapis, es- pereble ne nur min:

- Neniu kuraĝis aserti, ke Esperanto havas mankojn, precipe, ke ĝi ne havas kulturon. Tio des pli, ĉar la enkonduka preleganto Peter Altmaier esprimis sin pli-malpli laŭvorte jene: „Ne parolu Oksfordan anglan en la eŭropaj instancoj, oni ne komprenus vin. Parolu krudan ĵargonon surbaze de la angla, kiun oni nomas Globish.“ Do, fino de la nobla kulturo.

- Miaj bazaj argumentoj restis sen kontraŭa argumento: nome, ke Esperanto estas pli facile lernebla, zorgas por egalrajta komunikado kaj taŭgas kiel lingva eŭropa identigilo.

- La relative malmultaj nefunkciuloj en la salono parte tre pozitive reagis al Esperanto. Ŝajne subtenis nin ankaŭ kelkaj ĉeestantaj idistoj dum la voĉdonado. Mi provis dissemi la ideon, ke estus utile, libervole oferti Esperanton en lernejoj. Tamen la plej multaj ne komprenis, ke la angla kiel komunika interlingvo endanĝerigas la gepatrajn lingvon, dum Esperanto en tiu rolo ne. Resumo: De politikistoj ni atendu nenion aktivan subtenon de Esperanto. Ni alstrebu, per pozitivaj informoj atingi la toleron, oferti Esperanton libervole en lernejoj. Poste (tion mi kredas) la rezultoj estas tiom konvinkaj al la civitanoj, ke la premo al politikistoj, plialtrangi la pozicion de Esperanto en la socio kreskos.

Ni devas krome, en la kadro de Eŭropa Esperanto-Unio, kompili klaran koncepton, kiel ni teorie imagas la uzon

de Esperanto en la eŭropaj instancoj. Ŝajne tiuj konceptoj intertempe jam estas sufiĉe kongruaj. Kompreneble devas ekzemple pluekzisti la rajto de ĉiu parlamentano kaj de ĉiu civitano, paroli en sia gepatra lingvo kaj ricevi respondojn en ĝi.

Kiel Martin Schäffer mi tre dankas al dekduo el niaj vicoj, kiu subtenis min el la publiko kaj poste uzis la okazon por dissemi niajn ideojn en personaj interparoloj kun ne-Esperantistoj.

Rudolf Fischer

Glosse

Durchbruch

des maschinellen Übersetzens?

Computerübersetzungen sollen ja Esperanto überflüssig machen. So las man schon vor 30 Jahren. Das vom damaligen Forschungsminister Riesenhuber für 2000 angekündigte „Verbomobil“ („Deutsch rein - Japanisch raus“) geriet rechtzeitig vor der Jahrtausendwende in Vergessenheit. Nun gibt es einen neuen Ansatz. „Der Computer lernt das Übersetzen“, verkündete die Universität des Saarlands am 24.01.2007. Ein Projekt EuroMatrix setzt riesige zweisprachige Textkorpora mit statistischen Mitteln ein. Weltweit am fortgeschrittensten soll eine Forschergruppe der Firma Google sein.

Bislang sind die Ergebnisse gerade bei Google aber eher zwerchfell- als welterschütternd. Hier eine Textprobe aus „Picasa für Linus“, offensichtlich aus dem Englischen ins Deutsche übersetzt: „Picasa ist Software, der Hilfen du sofort alle Abbildungen auf deinem Computer finden, redigieren und teilen. ... Du kannst schleppen und der Tropfen, zum deiner Alben zu ordnen und der Aufkleber neue Gruppen verursachen zu lassen. ... Picasa bildet auch das vorgerückte Redigieren einfach, indem er Einklicken Verlegenheiten und leistungsfähige Effekte an deinen Fingerspitzen setzt. Und Picasa läßt einen Schnapper deine Abbildungen teilen – du kannst email, Fotos und sogar Pfastenabbildungen auf deinem eigenen blog nach Hause zu drucken.“

Rudolf Fischer

Flugblätter

beim VDS-Bundestreffen

Gleich zwei Vorstandsmitglieder des Deutschen Esperanto-Bundes, Christof Krick und Rudolf Fischer, bewiesen am 16. Juni in Mühlhausen/Thüringen, dass sich der Vorstand nicht für Basisarbeit zu schade ist. Während die beiden Westfalen von weither anreisten, kam Monika Frense, die Dritte im Bunde, aus dem benachbarten Heilbad Heiligenstadt und konnte so die Einheimischen besser ansprechen. Stand und Werbematerial besorgte sie aus Herzberg. Zusammen nahm man so an einer „Sprachmesse“ anlässlich des Bundesdelegiertentreffens des Vereins Deutsche Sprache (VDS) teil.

„Wer Deutsch verteidigen will, darf nicht an der Grenze Halt machen“ war die Überschrift eines Flugblatts, das an die VDS-Delegierten und Zufallspassanten verteilt wurde. Immerhin wurden 50 Stück abgesetzt. Es gab einige freundliche und interessierte Reaktionen, aber gelegentlich auch Abwehr. Leider war die Stadt bei Sonnenschein und ein paar störenden Schauern ansonsten wie ausgestorben.

Drei-vier einheimische Passanten kannten Esperanto, fühlten sich animiert, es wieder zu aktivieren. Ein VDS-Delegierter stellte sich als Idist aus Berlin vor. Insgesamt muss man sagen, dass sich die weite Anreise der D.E.B.-Aktiven kaum gelohnt hat, auch wenn außer Fahrtkosten keine großen Ausgaben entstanden sind. Immerhin wurde dem VDS die Präsenz der Esperanto-Bewegung vor Augen geführt.

Rudolf Fischer

So stimmt's

In der Nummer 2007/3 von *Esperanto aktuell* wurde berichtet, dass Andreas Emmerich nach zwei dreijährigen Amtsperioden nicht mehr als Vorsitzender wiedergewählt werden konnte. Richtig ist, dass die Amtsperiode des Vorsitzenden zwei Jahre beträgt. Emmerich war also bereits dreimal – für je zwei Jahre – gewählt worden. Seine Amtszeit betrug sechs Jahre.

red.

Turisma kaj lingva seminario en Bahratal

Meze de junio (08.-11.06. 2007) okazis turisma kaj lingva seminario en Bahratal ĉelime inter Saksio kaj Bohemio,



Kultura kontribuo: kantado kaj tamburado.

organizita de la Esperanto-grupo Saksa Svisio kiu omaĝis al la 100-jara Esperanto-movado en la distrikta ĉefurbo Pirm.

La 24 partoprenintoj (inter ili 5 ĉeĥoj) loĝis meze de arbaro en finnstilaj kabanoj. Antaŭtagmeze la spertaj Espe-



La gastoj apud la seminariejo.

ranto-instruistoj Miroslav Malovec kaj Dr-o Benoit Philippe en du grupoj lerte paroligis nin. Posttagmeze ni migradis tra la pitoreska arbaroriĉa limregiono inter Saksa-Bohemia Svisio kaj Bohemia Mezmontaro.

Vespere ni serioze (kun sciencaj klarigoj pri la sanigaj efikoj) trinkis bieron kaj ginseng-teon. Multaj aliaj interesaj diverstemaj prelegoj riĉigis la programon.

Frank Nitsche

100 jaroj Esperanto en Aŭgsburgo

La loka lingvoklubo festos centjaran jubileon kadre de la printempa kunveno de Bavara Esperanto-Ligo, la 2an ĝis la 4a de majo 2008.

Aŭgsburgo ofte gastigis Esperanto-okazaĵojn: fakajn, lokajn, regionajn landajn, naciajn kaj internaciajn renkontojn kaj kongresojn kiel ekzemple la Universalan Kongreson en 1985. En 2008 la loka Esperanto-Lingvoklubo organizos festaranĝon kiu okazos en la konferenca centro (Tagungszentrum) DIAKO, tre proksime al la ĉefstacidomo (5 ĝis 8 minutojn piede). Tiu centro apartenas al malsanulejo Evangelische Diakonissenanstalten kaj troviĝas en bela, trankvila parko, tamen meze en la urbo. Ĝi ankaŭ disponas pri propra parkdomo. Pluraj parkdomoj estas tre proksime. Parto de DIAKO estas hotelo kun 34 unulitaj kaj dultitaj ĉambroj kun duŝo, necesejo, TV. Partoprenantoj kiuj deziras tranokti tie devas anonci tion ĝis la 31a de januaro 2008. Poste ni ne plu povas garantii liberan ĉambron en DIAKO-hotelo. Aliaj tranokteblecoj ankaŭ ekzistas sufiĉe proksime al la renkontejo. Kiu deziras preni unu el tiuj tranokteblecoj devas mem mendi. La organizantoj estas kompreneble pretaj doni konsilojn/adresojn. La urba administracio de Aŭgsburgo tre bonvoleme kaj afable akompanas nian tiucelan aktivecon. Kvankam mallonge antaŭ nia aranĝo okazas novelektoj de la urba parlamento oni pretas subteni kaj akcepti nin.

Ni klopodas publikigi nian kompletan programon post la komuna kunsido de la loka klubo kaj la BELO-estraro en aŭgusto.

Jen la jam konkretaj programeroj: akcepto de la partoprenantoj en la urbodomo de Aŭgsburgo, sabaton, la 3an de majo 2008, je 09h30, kunsido(j) de la BELO-estraro, laŭeble kunsido de kunlaborantoj de la Germana Esperanto-Instituto sub la gvido de ties direktoro prof. d-ro Martin Haase, membrokunveno de la Bavara Esperanto-Ligo, rondiro en la malnova urbodoma parto

sub la titolo „Kun Brecht en la Lechkvartalo“ sub la gvido de J. M. Ipferkofer, publika festvespero, sabaton, la 3an de majo ekde la 19a horo kun enkonduka prelego de Stefan Maul (rerigardo al 100 jaroj Esperanto en Aŭgsburgo), festprelego (germanlingve) de prof. d-ro Martin Haase, Universitato Bamberg, Esperanto-familio prezentas sin, muzika kadro kun Jacques LePuil, Bourges (franca ĝemelurbo de Aŭgsburgo) kaj kanthoro de Andree Nußbacher (muzika pedagogino), inaŭguro de la nova Esperanto-renkontejo „Bürgertreff Hochzoll“ kun informoj pri la restaŭrado de tiu malnova lernejo, konversacioj, muziko kaj etaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Pluaj informoj kaj detalaĵoj sekvos. Interesuloj kiuj havas demandojn aŭ mendojn turnu sin al: Stefanie Tucker, Breitenbergstr. 7, 86163 Augsburg, Germanio, 0821/664339, fakso 0821/663466, g.tucker@gmx.de

Gerald Tucker

Esperanto-salato en Herzberg

Je la 30a de junio 2007 granda grupo – homoj el Herzberg kaj el diversaj lokoj en Germanio kaj el Belgio, Nederlando, Hispanio kaj Hungario – gustumis



La estrino de la greka restoracio Akropolis Lamprini Panta, Vassilli Sbonias, Veronika Acsadi kaj Peter Zilvar kun la nova Esperanto-salato.

la unuan Esperanto-salaton en la greka restoracio „Akropolis“ en Herzberg. La nova kreitaĵo enhavas freŝajn verdajn salatelementojn kaj kaprinofromaĝon. Sur la Esperanto-salato troviĝas kvin-pintaj steloj el verda papriko.

ICH

Internacia fotokonkurso de „La Ondo de Esperanto“

Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998-2006) la redakcio de „La Ondo de Esperanto“ invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. En la fotokonkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektromike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro de 2007.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, vera nomo, poŝta adreso kaj retadreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj. Estas speciala premio por la plej bona foto pri la temo Festoj.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en „La Ondo de Esperanto“. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro en 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-raĵon havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

*Halina Gorecka
sekretario, sezonoj@kanet.ru*

Internacia konkurso pri kurtfilmoj

Triesta Esperanto-Asocio lanĉas la duan internacian konkurson pri kurtfilmoj, je libervola temo, ital- kaj/aŭ esperant-lingvaj, aŭ alilingvaj sed kun surskribaĵoj en la itala aŭ esperanta lingvoj. La kurtfilmoj povas esti ankaŭ senparolaj.

La verko, sendota al la konkurso, ne

estu jam prezentita en aliaj similaj aranĝoj, tial la aŭtoro subskribu oficialan deklaron tiusence.

La kurtfilmo devas esti en formo de DVD aŭ VHS kaj ne superu 15-minutan daŭron. Ĝi ne estos redonita. La aŭtoro sendu poŝte sian verkon ĝis la 15a de decembro 2007 al tiu ĉi adreso: Esperanto Trieste, C.P. 601 Trieste Centro, IT-34101 TRIESTE – ITALIA

Franz Josef Braun

Paŭlo Moĵajev nova redaktoro de „Kontakto“

Per komuna decido de la estraroj de TEJO kaj UEA Pavel (Paŭlo) N. Moĵajev el Ukrainio transprenos de Ĵenja Amis la redaktorecon de „Kontakto“. Ĵenja Amis estas redaktoro de la socikultura revuo de TEJO ekde 2002. Post pli ol kvinjara sukcesa kaj multe laŭdata laborado ŝi laŭgrade transdonos la respondecon al sia posteulo ĉi-jare. Paŭlo Moĵajev naskiĝis en 1981 kaj diplomiĝis en 2003 en la Krimea Ŝtata Medicina Universitato en Simferopolo, kie li nun estas instruisto pri anatomio. Kun Esperanto li konatiĝis en 2000 kaj ekde tiam aktive partoprenas la landan movadon. Ekde la jaro 2003 li okupiĝas pri provlegado de „Kontakto“, kies redaktoron li pasintjare ekhelpis kiel vicredaktoro. Partoprenantoj de pluraj Esperanto-aranĝoj povis ekkoni ankaŭ liajn muzikajn talentojn; ekz. en IJK-oj en 2004 kaj 2005 li koncertis prezentante proprajn kantojn. Moĵajev estas ankaŭ aktiva Esperanto-instruisto kaj diplomiĝis pri la Cseh-metodo. Li verkas, tradukas kaj lastatempe laboras ankaŭ je Esperanta-rusa vortaro.

*el gazetara komuniko de UEA 261
fonto: Ret-info*

Comenius Esperanto in Litauen

Im Rahmen eines von der EU geförderten Comeniusprojekts waren wir vom 21. Mai bis zum 1. Juni 2007 Gastlehrer am Merkelio Račkausko Gimnazija in Mažeikiai, Litauen. Sehr erleichtert wurde uns die Kommunikation durch drei Lehrerinnen an dieser Schule, die Esperanto sprechen. Folgende Fremdsprachen werden hier un-

terrichtet: Englisch, Russisch, Deutsch und Esperanto. Derzeit lernen bei Gražina Opulskiene 13- bis 18-jährige Schülerinnen und Schüler in drei Gruppen Esperanto. Gražina Opulskiene ist außerdem Bibliothekarin und unterrichtet das Fach „Sicherheit im Alltag“.

Frau Opulskiene informierte uns in Esperanto eingehend über das Unterrichtswesen und das Bildungssystem in Litauen. Sie vermittelte uns auch Gespräche mit dem Bürgermeister und dem Vizebürgermeister der Stadt Mažeikiai, wobei sie ebenfalls als Dolmetscherin fungierte.

Walter und Renate Klag

Festo en Antverpeno

La Antverpena klubo „La Verda Stelo“ festis sian centjariĝon dum Pentekosto 2007. Do estis malfacila decido, ĉu partopreni tie aŭ la Germanan Esperanto-Kongreson en Hamburgo. Pro internacieco kaj malnovaj amikecaj ligoj ni finfine elektis Flandrion. Kaj ni malbedaŭris la decidon!

Ĉe la urbodoma akcepto ni inter 15 nacioj reprezentis Germanion, sed tio estis nur unu ero el la abunda programo. Okazis kursaro pri Vikipedio, diversaj prelegoj kaj ekskursoj al multaj vidindaĵoj en Antverpeno.

Kulmino estis la festbankedo sabaton vespere. Se mi – kiel konata elektema plendemulo rilate al mangaĵoj – konfirmas, ke estis amaso da bongustegaĵoj, vi povas kredi min. Ĉio estis memfarita de la Verdstelanoj, ne nur por la bankedo, sed la tutan semajnfino.

La bankedon kronis koncerto de Jomo, kiu tiel rave ludis kaj kantis, ke ĉe la fino la junularo dancis sur la tabloj.

La ĉirkaŭ 150 partoprenantoj travivis ne ian jubilean aranĝon, sed veran feston. Eĉ la deĵorantaro ĉe kaso, bufedo, kuirejo kaj aliloke, kiu vere multege laboris, trovis momentojn por ĝui la etoson, tiel ke ĉie videblis nur gajaj vizaĝoj.

Gratulon al la Antverpenanoj pro la sukcesa semajnfino, dum kiu ĉiu trovis ion laŭ sia gusto, de la etaj infanoj ĝis la 92-jara honora prezidanto. Ili vere scias festi!

Pit Hauge